Ponta Festo en Frankfurt (Oder) 2008-05-01

Jam la duan fojon EABB partoprenis per informstando ĉe la „Ponta Festo“ de la urbo Frankfurt (Odro) je la 1-a de majo 2008. Tiu stando informis laŭplane pri Esperanto kaj la diversaj eblecoj de aplikado de internacia planlingvo.
Denove tio estis bona okazo por renkontiĝi kaj pluraj esperantistoj el Pollando, Rusio, Berlino kaj Brandenburgio kunvenis por ĝui kaj demonstri internacian etoson. Pro tempaj malfacilaĵoj ĉifoje ne venis tiom da esperantistoj, sed tamen ĉio fariĝis sukcesplene. Krzysztof Kolanowski, kiu laboras en universitato Viadrina ne nur aktive preparis la informstandon, sed ankaŭ tre bone prezentis Esperanton al la alvenintaj pasantoj.
Precipan atenton ricevis Esperanto-katetoj, kiujn sponsoris samideanino Waltraut Stapelfeldt el Ludwigsfelde. Al tiuj belegaj artefaritaj katetoj ni donis la freŝeldonitajn faldfoliojn de GEA kiel instrukcioj pri uzo.
Ankaŭ okazis kunveno en la restoracio “Odra” en la najbara pola urbo Słubice, kiu ĉefe servis al la refortigo de la gastoj.
Ankaŭ menciindas, ke la loka televidstacio de Frankfurto faris etan intervjuon kaj ankaŭ prezentis parton de tiu enkadre de la raportoj pri la “Ponta Festo”.
Precipe mi ankaŭ dankas al mia edzino, kiu forte helpis dum la transporto de la ekspoziciaĵoj kaj malkonstruo de la informstando.
Post la fino de la festo ĉiuj esperantistoj bone amuziĝis kaj diskutis en restoracio en Słubice.
Jam nun mi invitas al la sekvontjara “Ponta Festo”.

Ronald Schindler